Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

2a jaro Oktobro 1988 Numero 11 (5)

ESPERANTO

la Internacia Lingvo



pri la kongreso * * *



LOKA KONGRESA KOMITATO

PREZIDANTO: José Luis Bringas Tellechea.
VICPREZIDANTO: Julio J. Juanes Sáinz.
SEKRETARIO: Iñaki Vélez Ortiz.
KASISTO: Jesús Miguel García Iturrioz.
KOMITATANO PRI PUBLIKAJ RILATOJ: Eduardo Larrouy López.
KOMITATANO PRI KOMUNIKAJ MEDIOJ: Keti Sesmero Cutanda.
KOMITATANO PRI KONGRESEJOJ: Tomás Apraiz Riberas.
KOMITATANO PRI EKSKURSOJ KAJ BANKEDO: Teodoro Ibáñez Martín.
KOMITATANO PRI LOĜADO: Frieda Van Houten.
KOMITATANO PRI ARTAJ PROGRAMOJ KAJ KONFERENCOJ: Julio J. Juanes Sáinz.
KOMITATANO PRI JUNULARAJ PROGRAMOJ: Santiago Martín Relea.
KOMITATANO PRI EKSPOZICIO KAJ LIBRO-SERVO: Iñaki Vélez / Jesús M. García.
KOMITATANO PRI INFORMOFICEJO: Igone Manciles Marín.
KOMITATANO PRI FILATELAĴOJ: Juan Lizeranzu Ortega.

ALIĜOJ

Ni jam ricevas konfirmitajn aliĝilojn ĉefe el Bilbao, kaj la membroj de aliaj grupoj ricevos ilin tra la venonta numero de "BOLETIN" de H.E.F.. Ni sendas tuj la konfirmilajn kartojn.

KONGRESEJO

Ni povas anonci ke la solena malfermo de la Kongreso okazos en la ĉefa salono de la Ekonomia Fakultato de Sarriko-Deusto, kiu dependas de la oficiala Vasklanda Universitato.

****

"ONI POVAS MORTIGI ĈIUJN FLOROJN,
ONI TAMEN NE POVOS FORIGI LA PRINTEMPON..."

★

MARIANO IZAOLA MARTINEZ

La pasintan 3-an de Okt , 77-jara, forpasis en Bilbao nia kara amiko MARIANO IZAOLA. Unu el la fondintoj de la GEB en ĝia nuna epoko, li apartenis al tiu aro de blinduloj, kiuj tiel multe laboris favore al Esperanto dum la 50-aj jaroj; ni ne forgesu ke en tia malfacila tempo, la sidejo de la Blindula Organizaĵo estis ejo kie disvolviĝis, diversflanke, la agado de la E-movado en Bilbao, ĝis kiam ni finfini atingis nian nunan sidejon.

Malgraŭ ke dum la tri lastaj jaroj, unue pro riparado de la stratoj de la Malnova Bilbao-a Kvartalo, kio konfuzigis lian blindan memoron, plena da vojplanoj tra ili, kaj poste, pro lia malsano, li ne vizitis nian Grupejon, ankoraŭ por ni ĉiuj, estas la "tablo kaj seĝo de Mariano" tiuj, kiuj, kiujn li ĉiam uzadis.

KE LI PACE RIPOZU!

****

KRISTNASKA LOTERIO

****

LOTERIA DE NAVIDAD.- Como de costumbre, ya están a disposición de todos los interesados, que esperamos sean muchos, las participaciones de nuestro Grupo para tomar parte en el tradicional sorteo de Navidad. Este año, el número de la suerte es el 06.958. **Las participaciones son de 250 pts. cada una.** Toda ayuda para la venta de los recibos será bienvenida.

ESPERANTO SURSTRATE.- Kun la preteksto propagandi la novajn kursojn de Esperanto, gejunuloj el nia Grupo starigis tablon en centra placo de Bilbao, de kie ili informis la multenombran preterpasantaron pri diversaj aspektoj de la Internacia Lingvo. Krome, sur la tablo kuŝis diversaj elektitaj verkoj, kiuj unuavide frapis kaj ŝokis la plej scivolemulojn, malfermante pordon al informa interparolado.

Malgraŭ preskaŭ kutima kaj neevitebla najbareco de politikaj grupoj (pli bone, grupetoj), hipioj, vendistoj de metalrubaĵoj, k.t.p., la sperto estis sukcesa kaj ripetinda.

★★★★★★★★★★★

Ĉu vi scias ke....? .- La fama brita E-verkistino Marjorie Boulton, en sia laste aperinta libro "Faktoj kaj Fantazioj" (eld. UEA. Roterdamo,1984), dediĉas ĉapitron (numero 25, paĝo 205) al vaskoj, kun malgranda enkonduko pri la E-movado en Vaskio?.

"Unika legolibro, plej bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studantoj de la Internacia Lingvo."

Baldur Ragnarsson

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

de Marjorie Boulton

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj....

* ekzercigas frazstrukturadon
* kreskigas skrib- kaj parolkapablon
* pligrandigas la vortostokon.

Miru, amuziĝu kaj lernu en pli ol 52 ĉapitroj.

Rotterdam: UEA, 1984. 431p. 21cm. **Prezo: 1.900 Pesetoj.**

* Petu ĝin ĉe la Grupo.

* Vi trovos ĝin ankaŭ en nia Biblioteko.

NOVAJ KURSOJ.- La pasintan 3-an de Oktobro ni ekigis kiel kutime, novan elementan E-kurson en nia sidejo. Laŭ la tendenco de la lastaj jaroj, ankaŭ ĉi-tiun, malmultaj novaj lernantoj interesiĝis pri ĝi: nur ok. Instruas, plenentuziasme, nia amiko Iñaki Vélez, kiu ŝajne, kapablas elporti sur sia dorso preskaŭ ĉiujn taskojn, kiujn postulas funkciado de E-societo.

Je Februaro aŭ Marto ni nas startigi superan kurson kun la celo paroligi tiujn kiuj ankoraŭ ne kuraĝas sin eksprimi Esperante kaj, samtempe, akiri la necesan fluecon por paroli kun niaj vizitantoj dum la Hispana Kongreso. Do, atentu pri la dat- kaj hor-aroj de tiu-ĉi kurso, baldaŭ publikigotaj.

SUBVENCIO.- Antaŭ kelkaj tagoj, nia Provinca Deputacio regalis nin per 25.000-peseta subvencio, malgraŭ ke ni, porĉiamaj postulantoj, prezentis agadplanon por la nuna jaro, kiu bezonis, por sia plena disvolvigado, pli ol 800.000 ptojn. Granda diferenco, ĉu ne?.

NI KUNVENIS... .- kiel anoncite, la pasintan vendredon, 30-an de Septembro, por aŭskulti al niaj amikoj Frieda van Houten, Luis de Otaola kaj Teodoro Ibáñez, paroli pri siaj somervojaĝoj al la U.K. de Roterdamo kaj al E-Laborbrigado en Bulgario. Ĝiaj interesaj spertaĵoj vekigis la scivolemon de la, kiel kutime, domaĝe malmultenombra ĉeestantaro.

KUNVENTAGOJ.- Ni rememorigas vin ĉiujn ke, ĝenerale, ni kunvenas la ĵaŭdojn, ekde la sepa kaj duono, sed ĉiu labortago nia Grupo estas malfermita inter la 7ª kaj duono kaj la 9ª.

ESPERANTE ***

E-KURSO EN RADIO KAJ TELEVIDO.
En la 1-a de Majo la Televidstacio kaj Radio, la E-Asocio kaj Eduka Eldonejo de Ljaŭning-provinco (Ĉinio) kune organizis E-kurson en televido kaj radio, kiu daŭros ses monatoj, kun pli ol 4.000 lernantoj.

GIGANTA KURSO FINIĜIS. En Pollando finiĝis giganta Esperanto-kurso, kiun partoprenis pli ol 3.000 personoj el la tuta lando. La kurson organizis la revuo "Nowa Wieś" (Nova kamparo) per ĉiusemajna plublikigo de 35 lecionoj. Nun oni daŭrigas la agadon per ĉiusemajna aperigado de "Esperanto-klubo" kun mallongaj Esperanto-tekstoj, gramatikaj kaj leksikaj klarigoj, informoj pri la praktika aplikado de Esperanto, novaj libroj, ktp.

OLIMPIKOJ SEULO '88. K.O.O.K. (Korea Olimpika Organiza Komitato) nomumis du esperantistoj oficialaj interpretistoj en Seulo, kiuj laboris dum la pasintaj Olimpikoj kiel Esp-interpretistoj.
Vere signifa estas la fakto, ke Esperanto estis unu el la agnoskitaj kaj interpretataj lingvoj dum Olimpikoj en Seulo.



KVANTE... En la 73a Universala Kongreso de Esperanto (Julio, Roterdamo), partoprenis 2.321 kongresanoj el 63 landoj.

En la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso okazinta en Zagrebo (Jugoslavio) estis la 3-a laŭ grandeco en la historio de TEJO kun 750 partoprenantoj el 46 landoj de ĉiuj la kontinentoj.



HAVANA KONFERENCO. De la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 1988 Kuba Esperanto-Asocio organizas en Havano Internacian Konferencon ESPERANTO '88" pri la evoluo de E-o en Iberoameriko. La programo inkludas prelegojn, ekspoziciojn, renkontiĝojn kun

.../...

kubaj geesperantistoj, vizitojn al E-lernejoj, turismon, ktp.

5 MILIONOJ DA LIROJ. La urbo Torino (Italio) subvenciis per 5 milionoj da liroj (500.000 p-toj) 6 kursojn de Esperanto por lernejanoj kaj lingvo-instruistoj, en 1987-88. La subvencio ripetiĝos, verŝajne pliampleksigita, en 1988-89. Certe, veran subvencion, kaj ne aliajn! (v. p. 5).

Ĉu vi volas korespondi?

La KORESPONDA SERVO MONDSKALA kreita de UEA antaŭ 32 jaroj nun moderniĝis kaj funkcias per komputilo. Ĉiujare milo da personoj utiligas ĝin.

Kion fari por uzi tiun servon? Sendu al KORESPONDA SERVO MONDSKALA "Les Hortensias 2", 121 bis, Bvd Napoleon III, F-06200, NICE, Francio viajn personan kaj familian nomojn, aĝon, sekson, civilan staton, kompletan adreson (preslitere, klare), indiku kiom da korespondantoj vi deziras, el kiuj landoj, pri kiuj temoj vi volas korespondi.


Aldonu du internaciajn respondkuponojn aŭ 1 US-dolaron en monbileto aŭ per poŝtkonto je la nomo de la komisiito: R. Llorens, Marseille 7.829.40.L. Se ne eblas al vi sendi monon aŭ IRK vi ne ricevos rektan respondon, ĉar K.S.M. ricevas neniam subvencion, sed via slipo estos enŝovita en la komputilon kaj pli malfrue vi ricevos leterojn de iuj korespondemuloj.

Havi plumamikojn en la mondo estas la plezuro de ĉiu esperantisto, kaj per K.S.M. PLI FACILE !

KSM

Koresponda Servo Mondskala
S-ro Llorens
Les Hortensias 2
121 bis Boulevard Napoléon III
F-06200 Nice
Francio

KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE:

1. Loĝejo;nomo de sumsigno. 2. Komencis marŝi;sen vokaloj, filo de filo. 3. Antaŭmomente; adjektiva finaĵo;estu feliĉa. 4. Kovri per oleo;amas´. 5. Greka litero;sen vokalo, maljes;ret., iasence, em´. 6. Infinitiva finaĵo;kolera. 7. Prunti ion pro mono;ating´ la celon. 8. Homa fluidaĵ´;finaĵo de participo; Adverba finaĵo. 9. Agem´. Mitestaĵo.

VERTIKALE:

1. Stari gardanta ion;Salamanka aŭtosimbolo. 2. Vid-organo; harar-fiksil´. 3. Maltrafe;brita monunu´. 4. Altvalora metal´;fari unuon el plural pecoj. 5. Tempa elementa vorto;litero antaŭ s;kvin. 6. Pasporta Servo;agi samkiel alia homo. 7. Kvindek;litero post g;sangujo. 8. Antaŭ ĉiuj;la lasta kaj la unua literoj;litero antaŭ ĝ. 9. Kio ekkondukas al solvo de iu afero;tem´ negoc´.

INTER ĈIUJ LA RICEVOTAJ SOLVOJ AL LA ĈI-SUPRA KRUCVORTENIGMO, NI LOTOS LA ĈI-SUBAN DONACLIBRON.

FABELOJ DE LA VERDA PIGO



Frandaĵo por ĉiuj inter 5- kaj 95-jaraj, kiuj ŝatas sanan ridon kaj bonan humuron.
Ĉiuj popoloj havas sian fabeliston: la danoj H.C. Andersen, la germanoj Grimm, la francoj La Fontaine ktp. ktp. ... la esperantistoj nun havas Beaucaire !!!|

KOLEKTITAJ DE LOUIS BEAUCAIRE — **TK/STAFETO** *112 paĝoj*